

# ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

1946

39-a jaro

N-ro 498

## Nova horizonto

Per la nuna numero la 498-a finas epoko kiun estonta historiisto de nia celado povus difini kiel „batalon pri formo kaj enhavo“ de la Esperanto-Movado. Formo = organizo, enhavo = ideo! Dum tiu-ĉi longa periodo preskaŭ 40 jara, jen unu tendenco, jen la alia ŝajne venkis. Sed nur momente. Tiu-ĉi ludo „supren-malsupren“ tamen pruvis ion: nome, ke la du tendencoj en si mem estas pravaj. Kaj kiel konkludo el tiu-ĉi fino de konflikto rezultis la kunigo. Kio do estas tiu-ĉi misteraj fortoj interbatalintaj? Ne estas tiel, ke luktis inter si la „Bono“ kun la „Malbono“, la satkonata maniero simpligi aferojn. Estas nenio alia ol la respondo al la demando, ĉu nia celado estas **nurlingva** aŭ **nur-idea**! Parto de l'Esperantistaro vidis en la lingvo ilon por praktikaj celoj, neante ĝian gravan influon moralan, la alia parto vidis en ĝi plej taŭgan rimedon por akceli la pacon intergentan.

Ambaŭ vidpunktoj estas pravaj, pruvitaj milfoje per la spertoj. Danĝera estas **nur** la ekstremismo, la ekskluziveco defendante unu direkton en la movado kiel la sole taŭgan. Kiel en ĉio homa ankaŭ, en nia „verda familio“ okazis kvereloj, akompanataj de reciprokaj kulpigoj iafaje eĉ insultoj. Supozeble tiaj eksplodoj de l'animo ne estas komplete forigeblaj. La esperantistoj ja ne estas anĝeloj sed ankaŭ ne diablidoj. Filozofia spirito aŭ psikanaliziisto ja povus fari pri tio interesajn konkludojn. Kaj lingvemulo ĝojas eble pri la riĉeco de esprimoj uzitaj en tiuj disputoj.

La solvo de tiu-ĉi problemoj, la plej grava post la unueco de la lingvo, estas en la saĝa egalbalancigo de l'fortoj en la kreo de ponto kunligante ambaŭ. La milito kun ĝiaj sekvoj laŭvide ebenigis la vojon al la kunigo de la du organizoj kiuj tiel bone reprezentas la agantajn fortojn de la movado. Estas ĝojige, ke en tiu-ĉi mondo de perforto unu el la elementoj por paco popola, la Esperanto-movado per diskuto, traktado kaj akordo forigis malnovan antagonismon. Se la potenculoj de l'mondo agus simile, realiĝus tiam la postulo „paco sur tero por homoj de Bona Volo“

15 decembro 1946.

Hans Jakob

Postrimarko: La literoj — UEO — t. e. Unueca Esperanto-Organizaĵo ne premias la definitivan nomon de la kunigintaj Asocio kaj Ligo. — Sur paĝo dua de tiu ĉi numero ni represas kiel dokumenton, la bazon de la diskutoj, el kiuj rezultis post reciprokaj koncedoj, la akordo pri kunfandiĝo. Pri la funkciado de la nova organizaĵo ni informos en la venonta no. (499) de ESPER.



**Historia dokumento :****La plano pri kuniĝo de UEA kaj IEL****Principoj**

Ekzistas nur unu organizaĵo esperantista senpolitika sub la nomo UNUECA ESPERANTO-ORGANIZO kiu kunigas la du organizaĵojn similajn: Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Esperanto-Ligo.

UNUECA ESPERANTO-ORGANIZO (aŭ organizaĵo) estas formata de la Naciaj Esperantistaj organizaĵoj rekonitaj, de individuaj membroj diverskategoriaj. Aliĝo de profesiaj societoj esperantistaj (Fakaj k. t. p.) estas antaŭvidata sub certaj kondiĉoj.

La aliĝo al la Unueca organizaĵo estas kolektiva per la Naciaj Esperanto-organizaĵoj (baza membro, ricevonta nur membro-karton, servokuponon kaj rajtigata uzi la servojn de la Delegitoj), plie de kompletaj membroj diverskategoriaj kiel ĝis nun (MJ, MA, MS, DM, HM, Patronoj) kiuj povas aliĝi per la landaj organizaĵoj aŭ kie ne estas speciala aranĝo rekte ĉe ĉefdelegito aŭ peradejoj.

UNUECA ESPERANTO-ORGANIZO estas regata de Komitato kaj de ESTRARO. La komitato estas formata

1. De anoj nomataj per la Naciaj organizaĵoj, laŭ la nombro de la kolektive aligitaj anoj (Nacia principo).
2. De anoj elektataj pere de la Delegitoj de UEO kiuj reprezentas la supernacian principon.
3. De anoj invitataj pere de la Komitato laŭ maniero 1—2 ĝis unu triono de ilia nombro (se estas ekzemple 27 anoj, oni rajtas do inviti naŭ). Ĉi tiuj invitataj anoj estu personoj, kiuj pro ilia rolo en la movado, pro servoj gravaj faritaj povus servi al la UEO, kaj kiuj ne povas esti anoj laŭ 1—2.

La Estraro de UEO, kiu gvidas la organizaĵon konsistas el 9—11 anoj de la Komitato inter ili minimume du britaj kaj du svisaj anoj.

UNUECA ESPERANTO-ORGANIZO havas du oficejojn, unu en Britujo alian en Svislando, ambaŭ kun difinitaj taskoj firmaj-konstantaj kaj aliajn difinitaj laŭ cirkonstancoj kaj laŭ praktikaj konsideroj de la tempo. Ekzemple la brita oficejo okupiĝas pri la administrado, la financoj, la kontrolo de la membroj, la rilatoj kun la Naciaj Esperantistaj organizaĵoj, pri ĝeneralaj aferoj internaj dume la oficejo en Svislando okupiĝas pri la servoj, la rilatoj kun la Delegitoj, la redaktado de la gazeto.

Kontrolas la funkciadon de la oficejoj du estraranoj nesalajrataj kaj loĝantaj proksime de la oficejo, aŭ eventuale ili transprenas certan parton de la farota laboro, ekzemple redaktado (honorofice).

**Financoj**

La du branĉoj de l'UEO starigas kune la budgeton kiun ekzamenas la Estraro kaj la Komitato. La enspezoj estas dividataj proporcie al la plenumataj laboroj, necesaj por la bona funkciado de la organizaĵo. La du oficejoj respondecas mem pri la sindevigoj rezultigantaj el la agado (ekzemple presado, ĝeneralaj kostoj, salajroj) konforme al la jara agadplano akceptita de la Komitato kaj de la Estraro. Praktikaj aranĝoj pri transpagoj, uzo de blokita mono por presigi ion, k. t. p. donu la necesan elastecon al la agado.

**Transira reĝimo 1946/48.**

Antaŭ definitiva kunfandiĝo de la du organizaĵoj estu periodo de transiro, komenciganta de 1946 kaj daŭranta ĝis fino de 1948, maksimume tri jarojn.

La havaĵoj de la du organizaĵoj restu al ili kaj servu por certigi el la rentumo la ekziston de la oficejo (lupago) kaj eventuale salajron al administra oficisto, parte aŭ tute okupata.

La JARLIBROJ de la nunaj organizaĵoj, UEA, IEL formu unu, presatan en Britujo. Ĝi portu la titolon

**Jarlibro de la Esperanto-movado**

kun eventuala subtitolo

**Universala Esperanto-Asocio** Internacia Esperanto-Ligo  
kaj enhavu kiel kutime tion, kion enhavis la du jarlibroj ĝis nun. La Delegitojn oni povus kunigi kaj jam nomi ilin Delegitoj de la

**UNUECA Esperanto Organizaĵo**

ĝis la momento kiam la definitiva nomo estas akceptita de ĉiuj. ESPERANTO de UEA <sup>substante</sup> la sola organo aperonta monate laŭ amplekso minimuma de ok paĝoj kaj pli ampleksa laŭ la enspezoj. Redaktas ĝin la nuna redaktoro **honorofice** kun la helpo de bonvolaj kunlaborantoj kiel estis farataj ĝis nun de la du organizaĵoj. La du komitatoj, UEA kaj IEL daŭras funkciadi kiel ĝis nun, ili kune formas la UNUECAN KOMITATON de la ESPERANTO MOVADO ĝis definitiva adopto de la nova sistemo.

Ĝis tiu ĉi dato validas la statutoj de la du organizaĵoj en ĉiuj punktoj escepte en tiuj kiujn en si mem nuligas nuna aranĝo transira.

Por netpretigi la teknikajn detalojn, UEA kaj IEL delegas kompetentulon, unu por ĉiu, kiuj kunvenu en difinita loko kaj poste submetu al la du komitatoj siajn proponojn pri teknikaj detaloj, rezultigantaj el la diskutado. Ili likvidu ankaŭ aferojn de la pasinta epoko por krei klaran situacion.

**Argumentoj**

La konflikto en la Esperanto movado, kiu ja ne datas de 1936, sed kiu estas al la origino de la tuta movado estas la demando pri la ĝusta ekvilibro de la nacia kaj de la internacia principo. Ambaŭ estas defendeblaj, ambaŭ pretendas esti la sole ĝustaj, ambaŭ trovas siajn defendantojn kaj kontraŭulojn kaj rezultas el tio nura perdo de tempo kaj de forto. La situacio nuna postulas rapidan ordigon. Ĝi povas esti nur sur la bazo de la kompromiso, oni povus diri, sur bazo de reciproka kompreno.

Ne hazarde la du aspektoj de nia movado, (militanta-klopodanta) korespondas kun alia analogiaĵo.

**Al la NACIA principo** respondas la propagando, la varbado, la instruado, la enlanda kaj loka societa vivo,

al la **internacia principo** respondas la konservo de la akiritaj konsciaj esperantistoj, la servado per utilaj aranĝoj, la flegado de supernacia spirito, unuvorte la propra ideologio de la Esperanto-movado esprimita per Zamenhof en nia Himno.

Anstataŭ sin interbatali ambaŭ devus kuniĝi, ĉar unu ja bezonas la alian. Se la dueco ekzistas en la aspekto ĝi necese ne bezonas du organizaĵojn. Estas la tasko de la gvidantoj, de la kompetentuloj trovi rimedon por harmonie kunlabori, dividi la taskojn kaj konsentigi ĉiujn fortojn, ne al senfrukta diskutado pri la plej bona ŝtato, sed evolui tion, kio ekzistas al io pli bona.

La nuna situacio de la mondo, la faoso en kiu troviĝas precipe Eŭropo, la lulilo de la internacia lingvo, postulas nepre, ke estu konkordo inter la batalantoj por la paco per komuna helpa lingvo. La esperantistoj atendas de ni, ke ni interkonsentu, ke ni cedu en bagatelaĵoj por pretigi la vojon al fina triumfo.

Oni forlasu la ideon, kiu eble svarmas en iuj kapoj, ke eble la alia organizaĵo bankrotos. Estas evidente ke ambaŭ organizaĵoj, UEA kaj IEL povas vegeti, laborantaj sendepende unu de l'alia, sed ambaŭ ne vivas vere. Ke ili vivu vere, ke floru de la Esperanto movado, sub unu devizo, tio dependas de la adopto

UNUECA ESPERANTO ORGANIZO.

## Konsideroj pri organizo

Estas milfoje pruvita fakto, ke ĝenerala deziro aŭ postulo bezonas longan tempon por fariĝi realaĵo. Alia fakto estas, ke ĉiu progreso en la homa historio estas akirita tra maro da senlulziĝoj, larmoj kaj sango.

La du militoj, kiujn nia generacio devis suferi, progresigis multajn teknikajn inventaĵojn. Morale la militoj ne tiom influis la progreson de l'ideoj pri paco kaj paca kunvivado de l'popoloj. Ĝi eĉ fortigis tiun-ĉi naciisman senton kies lasta konsekvenco estas la kunpuŝiĝo, la milito.

En nia movado la du militoj detruis multon. Ili tamen influis konsiderinde la komprenon pri la rolo kaj povo de l'tutmonda organizaĵo esperantista. Post la unua milito sub la premo de l'kondiĉoj, la du tiamaj „kontraŭuloj“, Generalo Sebert kaj H. Hodler, reprezentintaj la du tendencojn en nia movado ellaboris la bazon por kunigi la fortojn. La dua milito kaj ĝiaj nekalkuleblaj sekvoj, devigis la respondecajn personojn, trovi solvon de konflikto, ne plu laŭtempa. La milito estas je l'origino de ĉiu aĵo, diris iom variigite, antikva pensulo.

Ni opinias firme, ke ankaŭ sen ĝi, ni Esperantistoj bonvolantaj, estus trovintaj la necesan akordon. Dependas de ni ĉiuj, de nia laboro ke la sekvoj el tiu-ĉi akordo estu bonaj kaj ke ni scias uzi la novan instrumenton. Por koni ĝin servu jenaj linioj.

### La bazo de l'Akordo

En Varsovio 1937 la reprezentantoj de UEA proponis al IEL aranĝon, kiu celis ĉefe reveni al pasinto, kun sola escepto ke estu du oficejoj, unu en Britujo, alia en Svislando. Tion la Estraro de IEL ne povis akcepti, ankaŭ UEA ne povis akcepti, ke ĝi malaperu. Mankis la premisoj.

La granda ŝanĝo okazis pro la milito. La izoligo de Svislando trafis plej senteble la internaciajn organizaĵojn kun sidejo en tiu-ĉi lando. Jam en 1939 la agado de l'sekretariejo de la Ligo de Nacioj limiĝis je simpla ricevo kaj komunikado de plendoj kaj protestoj, la duonoficialaj kaj la privataj organizaĵoj adaptiĝis al la novaj kondiĉoj pli malpli. Inter ili UEA kies esperantista agado estis forte ĝenata pro la poŝta kontrolo germana (rekta aerpoŝto de Svislando al transmaraj landoj ne ekzistis) kaj pro tio ke UEA estis sur la nigra listo de l'germanoj. La agado de UEA limiĝis al la Servo de Interhelpo funkciinta eĉ en rilatoj kun Germanujo kaj okupitaj landoj. Kontraŭe IEL povis libere labori laŭ la ebleco de l'tiama vivspaco de Esperanto kaj ni diru ĝin malkaŝe: dank'al la oferemo de l'brita esperantistaro kiu materie certigis la ekziston!

Kaj la konkludo el tio? Ke akordo sur la bazo de l'donitaĵoj havas sencon, ke ambaŭ flankoj devos trovi sin mezvoje akceptante la realecon tia kia ĝi estas. Kaj la „ora mezo“ estas precize la konservo de tio, kio estas karakteriza en ambaŭ formoj de organizo. la edziĝo laŭ prudenteco!

### Rezonado.

Estas certe, ke la 100 % defendantoj de la du organizformoj ne estas kontentaj. La centprocenta IEL-ano opinas, ke la Ligo pruvigis sian ekzistopovon, ke la absoluta neŭtraleco en ĉiuj tuthomaraj aferoj devas esti supera maksimumo, ke ne valoras akcentigi speciale nian idean ligiton al celadoj progresemaj.

Lia frato de l'alia flanko la 100 % UEA-ano forte argumentas ke la rigora supernacieco, la kvazaŭignoro de l'nacia elemento estas pli konforma al la ideoj de nia Majstro; UEA kun 1000—2000 anoj, konvinkitaj Zamenhofanoj, estas pli agadpova ol

asociĉ kun 10000—20000 anoj, inter ili kelkiloj da okazaj kunpromenantoj.

Ambaŭ opinioj respegulas certan fazon de evoluo en la mondo. Nenio estas firma en la formo; ĝi ĉiam ŝanĝas.

Restas ankoraŭ alia opinio, tiu de l' „man in the street“, la simpla civitano esperantista kiu verdire nenion komprenas el la disputoj pri la plej bona organizo. Li rezonas: „Mi estas preta pagi por progresigi valoran ideon, ne por eternigi konflikton, perdinta ĉian sencon. Sinjoroj, penu plenumi postulon primitivan“ respektu opinion de l'aliulo, iru renkonten je meza solvo, sed ĉefe ĉesigu ĉikanadon reciprokan.”

### Komentario de l'plano definitiva.

Atenta leganto de l'plano (vidu paĝon ĉi-kontraŭe) tuj komprenas ke estas kompromiso, kiu bazas sur realaĵoj. La gvido de l'organizaĵo apartenas al la Nacia elemento t. e. la naciaj organizaĵoj. Kun la gvido ĝenerala estas ligata la administrado kaj la financoj. Ĉio tio koncentriĝas en la oficejo en Britujo. La postulo de UEA Estraro proporcie partopreni en la budĝeto estis retirita pro praktikaj kaŭzoj.

La korelativo estas la Servoj. Ilin starigas, prilaboras kaj gvidas la centro en Svislando, laŭ la ekzistantaj rimedoj. Ĝi redaktas la gazeton ESPERANTO laŭ la ĝisnunaj tradicioj kaj tendencoj.

La kontraŭpezo de l'nacia elemento estas la Delegitoj kiuj devos reprezenti la servadon. La malsama maniero sendi anon en la komitato dokumentas la malsamecon de l'elementoj. Resume: oni povus diri, ke tiu ĉi Akordo estas ia „balance of power“ t. e. pezegaligo de l'fortoj.

Ĝi respondas plie al la ŝanĝita mondo. Nekontesteble estas, ke la naciismo plifortigis ĉie. Tiu-ĉi naiva internaciismo de l'tempo de Zamenhof estas for. Supozeble por ĉiam! La mondo dividiĝis en du partoj (spite eblaj kontraŭdiroj!) kaj Eŭropo fariĝis objekto de l'granda politiko. Financa, ni sur la kontinento, dependas de la bonvolo anglo-saksa (brit-usona) la mizeriĝintaj popoloj eŭropaj ludos por longa tempo ankoraŭ, laŭ laŭ „de l'malriĉaj parencoj“!

La solaj grasmakuloj en tiu-ĉi eŭropa akvosupo nome Svedkaj Svislando, neniel povos kompensi la mankon de kalorioj. Jam de tiu-ĉi vidpunkto la Akordo inter UEA kaj IEL nur konfirmas realaĵon.

### La du centroj.

Ambaŭ centroj plenumas do difinitan laboron. La „Servo Centro“, la Oficejo en Geneve, gvidata de honorofica administranto posedas la juran personecon por ĉio tio kio ĝin tuŝas. (Devigoj kaj rajtoj el la Akordo kaj el la definitiva statuto).

La administra centro en Britujo same respondecas pri la aferoj kaj agado de ĝi plenumata.

Decida por ambaŭ estas la leĝoj de la landoj de l'sidejo.

### Epilogo

Estas en jaro 1887 kiam aperis la unua broŝuro pri nia lingvo. Estis en 1917 kiam mortis nia Majstro, simbolo de l'unueco de nia ideo. Estos en 1947 kiam realiĝos la deziro de ĉiu sincera esperantisto: Unu neŭtrala lingvo kaj unu neŭtrala organizaĵo esperantista.

„Sep estas nombro sankta“, diras proverbo. La leĝo de l'serio observebla en la homa faro montru sin favora por ni, por nia movado, tiel ke ni povu diri emfaze: „Neniam plu milito inter ni“!

# Niaj mortintoj 1939-1946

## Dua listo

- Adamson**, Hendrik, estona samideano kaj poeto, 55 jaraĝa. (Laŭ LA ESPERO, sveda E-gazeto).
- Bailey**, William, ano de la L. K., kaj de la Akademio 80 jaraĝa, 1946. Unu el la distingaj figuroj de nia movado, „la homo kiu ĝisfunde konis la verkojn, lingvon kaj stilon de la Majstro“.
- Bairstow**, George, ano de BEA en Halifax, Anglujo, 55 jaraĝa, 5. XI. 1945.
- Barbi**, Rag. Adalgio, D de IEL en Chivasse, Prov. Torino Italie, 1945.
- Benson Wm S.**, D-ro, en Irvington, N. J., Usono. (Aŭtoro de la Universala Esperanto-Metodo) 20. X. 1945.
- Beveridge**, F-ino A. L., en Ippledon near Newton Abbot Anglujo, 2. III. 1946.
- Bloch** Robert, funkciulo en poŝta ministerio ĉeĥoslovaka, Praha, lasta ĝenerala sekretario de la Ĉeĥoslovaka Asocio de post 1936, malaperis kun edzino en koncentrejo de Oswiecim/Auschwitz. (Dato nekonata)
- Bobin**, Marcel, 70 jaraĝa, ano de la Lingva Komitato, proponinto de la ofico de konsulo esperantista, el kiu evoluigis la DELEGITO DE UEA, Februaro 1946.
- Borel**, Jean, pioniro de Esperanto en Germanujo, el Couvet, Neuchâtel, Svislando, kunfondinto de la eldonejo Möller & Borel Berlin, 77 jaraĝa, februaro 1946.
- Brandsteter**, Mieczyslaw (M. Brand) mortis en Varsovia ghetto, (Dato ne konata).
- Brigden**, W. J., Britujo, 1946.
- Carlén**, J. Th., honora membro de la societo en Orebro, Sved., malnova fidela samideano, 78 jaraĝa, 4. V. 1946.
- Chadwick** Jonathan, 93 jaraĝa kunfondinto de la grupo en Rochdale Anglujo en 1906 (la loko kie eliris la kooperativa movado!) 22. X. 1946.
- Chambers** F-ino Alice C., West Hartlepool, Britujo 31. III. 1946.
- Chmielinski** — estinta ĉefdelegito de IEL pola, forpelita el sia loĝloko Toruń, devigita labori fizike sen sufiĉa manĝo: 1944. (Preciza dato de la morto ne indikita).
- Couto Fernandez**, A. eminenta brazila samideano, tradukinto kaj verkinto, Rio de Janeiro 1946.
- Cupé** Jorge, VD de IEL en Rosario, Argentino, 15. IV. 1946.
- Currie** W. B., D de IEL en Woodley-Remsey, Angl., malnova samideano, 1946. (Preciza dato ne sciigita).
- Caušev** Angel Georgiev, el Batak, Bulgar. 38 jaraĝa, mortigita en amasmurdo, 1944.
- Danielsson**, Viktor, ano de la E societo en Orebro, Sved., 70 jaraĝa, 9. V. 1946.
- Donaldson**, William H., ano de EANA, New York, 7. II. 1946.
- Doorne** Van, C., DM de IEL en Rotterdam, 12. V. 1944.
- Ellerbock** Leopold D-ro, Ministeria Konsilanto, verkinto de E lernolibro, oferema sutenanto de nia movado, patrono de ICK kunlaborinto ĉe la teknikaj vortaroj, Berlin, 8. V. 1945, 73 jaraĝa, sekve de milita okazintaĵo. Altranga statoficisto kiu restis fidela al la principoj de humaneco kaj justeco.
- Fisher** S-ino A. 77 jaraĝa Kew Gardens, Anglujo, 18. IX. 1945.
- Feith** Siegfried, esperantisto el Vieno, rifuĝinto en Argentino, 1940 sen plia dato. (Laŭ Argentina Esperantisto, no. 236—237).
- Fiala**, Vaclav, Delegito de UEA en Mladé ap. C. Budejovice Ĉeĥoslovakio, Januaro 1946.
- Flach** Karl kaj edzino, prezidinto de la loka grupo en Salzburg Aŭstrio, estinta D de UEA, Aprilo 1946.
- Flajšr**, Leopold, esperantisto el Praha. Morto konstatita en tendaro Mauthausen, Aŭstrio, sekve de skribajo sub tablo de lia nomo kun dato 17. V. 1944, tago de ekzekuto.
- Gianfranceschi**, J., estinta VD de UEA en Buffalo, N. Y. Usono, 17. X. 1945.
- Gonzaléz**, Francisco, argentina esperantisto de 1906 de 1938 delegito de IEL en Tucuman, 7. VI. 46. Buenos-Aires.
- Gordon** George (GEGO) Christchurch, Novzelando, 89 jaraĝa, 18. I. 1946. unu el la unuaj esperantistoj en tiu ĉi terangulo. Tradukis diversajn librojn (Kara Panjo = La Kamena Angulo, Alegorioj el la naturo k. a.)
- Grenkamp-Kornfeld**, Salo la konata samideano el Jaslo, Polujo, vivinta en Parizo. Arestita de la GESTAPO li malaperis en iu tendaro en Silezio aŭ Polujo. Dato preciza ne konata.
- Gruber**, D-ro Ernst esperantista forpelita el (ĝam) germanlingva regiono de Ĉeĥoslovakio, en Lager Salza Thüringen, Junio 1946 (Laŭ letero reveninta).
- Grigar** Augustin, Kolin, ĈSR. (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta —)
- Hailstone**, S-ino W. E. estinta D de IEL, en Coventry, Anglujo, 5. VII. 1946.
- Hall** George F. Beacham, en South Cave Yorks., 30. VI. 46.
- Hellmann**, Kurt, D-ro Esperantisto en Vieno, estinta prezidanto de la Vien. Esp. Akademia Societo. Laŭ informoj estis ekzekutita en Mauthausen, koncentracia tendaro, 1944, 50 jaraĝa.
- Helma** Oldrich, el Brno, ĈSR., aviadisto, forlasinta la hejmlandon por batali kontraŭ la hitlerismo. Aviadilo falis en maron, Helma trovis la morton 7. VII. 1941.
- Hlavačova**, F-ino Klementina, anino de la Rondeto de Esperantistinoj en Praha, 23. V. 1942.
- Holzleitner**, Julius, profesoro, Gmunden, Aŭstrio, 17. III. 1946. Delegito de UEA.
- Horak** Jindrich, lokomotivestro, Strelice apud Brno ĈSR. Dato ne komunikita).
- Hradil** Vojtech, profesoro en Brno, ĈSR. (Dato ne komunikita).
- Jandlova**, F-ino Marie, Uherské Hradiště, ĈSR. 9. IX. 1942.
- Jones** F-ino Mair, D de IEL en Cardiff, Kimrujo (Wales) 9. X. 46.
- Jujukliev** Anastas, (Avo Taško) 62 jaraĝa, Sofia Bulg., De macedona deveno, li batalis por la liberigo de sia lando kaj suferis trijaran malliberigon sub turka regado, fervora samideano. 21. X. 1945.
- Kalpazanov**, Stoju, ano de la aktiva bulgara rezistado kontraŭ — faŝisma, mortinta kun armilo en mano (Dato ne trovita).
- Kasaly** Frant., profesoro en Tolč, ĈSR. (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta —)
- Katterns**, James L., en Dringhouses, Anglujo, 88 jaraĝa, 16. III. 1946
- Kieft**, F-ino J. en Laren, Nederlando, anino de UEA, Januaro 1944 (laŭ informo de la fratino).
- Klaus**, F-ino Esther, ĵurnalistino, de Schwyz (Svislando) lerninte la lingvon sen instruisto, 37 jaraĝa, Marto 1946.
- Klavehn**, R. C., Kilmarnock, Skotlando, 15. VII. 1946.
- Koc** Vojtech, en Plzen, ĈSR (Dato ne komunikita).

- Kolarov** Todor Angelev, Esperantisto el Batak, Bulgar. Organizinto de sekreta defendgrupo li estis ekstermita kun ĉ. 150 aliaj homoj de la faŝisma reĝimo, 1944.
- Konop,** Jakub, direktoro en Praha-Smichov, ĈSR. (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta —).
- Krenicki** Ignacy, D-ro estrarano de KONKORDO, Varsovio, gazmortigita en Treblinka, Dato ne konata.
- Kremenak,** Jozef, Zabori p. Proseč u Skutče, ĈSR. (Gazeto ESPERANTO sendita al li je tiu adreso, revenis al ni kun la /ĉeflingva/ informo: Adresato mortinta en koncentrejo Terezin (t. e. Theresienstadt), 7. Majo 1945.
- Krolmus,** Karol, faka instruisto, Kralupy n. V., ĈSR., verkinto de lernolibro. (Poŝta sciigo — Mortinta —).
- Kujungić,** Voja, D-ro medicina, kuracisto en Beograd, Jugoslavio, 73 jaraĝa, 1946. Partoprenis en aro da klopodoj humanecaj inter alie por la ideo de la kremacio.
- Kukulka** L., pastro, predikinta en Esperanto dum la Krakova kongreso 1931 en preĝejo S-ta Maria, arestita de la Gestapo en 1939 kaj mortigita.
- Lavén** Bernhard, honora prezidanto de la E — societo en Orebro, Svedlando, 70 jaraĝa, 13. X. 1946.
- Lindhagen** Carl, sveda parlamentano, urbestro de Stokholmo, sincera defendanto de Esperanto, 85 jaraĝa, 1946.
- Mangada** Rosenörn, Julio, generalo de l'regula armeo respublikana meritplena pioniro de E en Hispanujo, kuraĝa defendinto de rajto kaj vero en sia militista kariero, distinga oficiro en la civila milito hispana, rifuĝinto en Meksiko, 16. Aprilo 1946.
- Mašek,** P. Jan Nepomuk, ekleziulo ĉeĥoslovaka, 82 jaraĝa, en Stupno, ĈSR., 13. V. 1946.
- Metzger** Max Josef D-ro (Frato Paulus) malnova samideano en Graz, Aŭstrio, katolika pastro, estinta komitatano de UEA, 1921—24, ekzekutita en Brandenburg a. d. Havel, 17. IV. 44 pro lia fideleco al homaranismaj principoj.
- Middlemiss,** Charles S., konata geologo, laborinta en Hindujo, propagandinta Esperanton en Kalkuto, 11. VI. 1945.
- Marootian,** Maneeg, estinta D en Long Island City, Usono, de armena deveno, 11. VII. 1946.
- Migacz** Jazef, instruisto en Nowy Sacz, arestita de la germanoj kiel garantiulo, mortigita 9. VII. 1944.
- Minor** Karl, Ano de la Lingva Komitato, sperta lingvisto, konata pro lia traduko de NATHAN LA SAGULO, dejorinta kiel interpretisto en Brita Armeo, en Germanujo, 22. III. 1946.
- Nooten** Van, D-ro S., kuracisto, Diever, Nederlando 7. VI. 1945, 46 jaraĝa, en Rothenburg a. d. T., Germanujo, mortinta en brita hospitalo post liberiĝo.
- Nowotny,** Heinrich, multjara propagandisto, en Gross-Siegharts, Aŭstrio, 63 jaraĝa, 10. III. 1946.
- Nyquist,** Gustav, 52 jaraĝa, en Skara, Sved., 18. II. 1946.
- O'Brien,** F-ino Elizabeth, 82 jaraĝa, anino de la BEA de 1903. 19. IV. 1946.
- O'Riordan** F. X., pastro, Birmingham, Michigan, USA, 13. VI. 45.
- Pačev,** Jordan (Volodja) ano de la bulgara rezistado kontraŭ-faŝisma, bruligita vive en bakejo. (Dato ne trovita).
- Papikova,** F-ino Marie, Praha, unu el la plej malnovaj membroj de la Rondeto de Esperantistinoj. (Dato ne komunikita).
- Parkin** Frank 56 jaraĝa, en Silford Ferris, Banbury, Britujo.
- Pasztejn** Eugenia komitatano de la societo LABORO en Varsovio, gazmortigita en Treblinka. Dato ne konata.
- Petkov,** Jevčo (Jelej-Jonkata), juna esperantisto laborista, el Burgas, Bulgario, aginta en la armeo kontraŭ faŝismo, kondamnita al morto kaj ekzekutita, 1944.
- Pelakova,** Jana, F-ino en Mlada Boleslav, ĈSR. (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta —).
- Ramshorst Van** den Berg, S-ino T., el Hago, Nijkerk, Nederlando, 1945.
- Reed** Herbert, Letchworth, 80 jaraĝa, 7. X. 1946.
- Rikkers,** J. E. F-ino, estinta sekr. kasistino de FINE GI VENKOS, esperantista societo en Hago, 7. IX. 1946.
- Robin,** Vilhelmo, D-ro medicina, Varsovio, pioniro de E inter kuracistoj, mortpafita de germanoj en Luck, 1942, 70 jaraĝa.
- Salomon,** Frederiko, advokato, estinta Delegito de UEA en Novisad, Jugoslavio, malaperinta kun edzino dum la okupacio germana. (Ni gardas bonan memoron pri tiu ĉi homarano, farinte gravan servon iam al ni H. J.)
- Sandberg** Olof, unu el la fondintoj de la E klubo en Landskrona, Sved., 1946.
- Santos dos,** Antonio, Lisboa, Portug., 69 jaraĝa, 30. I. 1946.
- Sasonov** David, Asenovgrad, Bulgario. Decida ano de la bulgara rezistado, arestita kaj mortinta pro manko de flegado en malliberejo, 13. IX. 1942.
- Schapiro,** Nathan, eldonisto en Varsovio, gazmortigita en Treblinka, (Dato ne konata).
- Schwarz** Alexander, estinta Delegito de UEA en Wieselburg a. d. Erlauf, Aŭstrio, estinta afergvidanta sekretario de la Germana Esperanto Asocio 31. Marto 1946 (Laŭ mallonga informo de Dro Eugen Wüster).
- Skace** Zdenek, Rajec nad Svitavou, ĈSR., (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta —).
- Soneson,** Albin, 56 jaraĝa, agema ano de la SEF kaj de SLEA, en diversaj lokoj svedaj, precipe en Söderhamn, 1946.
- Sörensen,** Eric, kasisto de la Laborista E-Klubo en Tröllhättan, Sved., 18. II. 1946.
- Spronsen Van,** W., en Hago, pro malsato dum vintro 1944—45.
- Stacy** S-ino Adelaide Elizabeth, 87 jaraĝa, esp-ino de 1907, 8. VIII. 46.
- Skodrov,** ano de la bulgara rezistado, torturita de la kontraŭuloj (Dato ne komunikita).
- Silhankova,** F-ino Plzen, ĈSR. (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta —)
- Sopov** Nikola, sekretario de Laborista Esperanto-Asocio, pendigita dum la faŝisma reĝimo, en Bulgario 1942.
- Sulerova,** S-ino A., vicprezidantino de la Esperantista Grupo en Pribor, ĈSR., 1943.
- Uebelhör,** Franz, estinta sekcia ĉefo de la ŝtata kancelario aŭstria, (Bundeskanzlei), 2. VI. 46, 75 jaraĝa, en Vieno. Fervoja amiko de nia movado, multe helpinta klopodojn en oficialaj aferoj.
- Ulbrich** Rudolf aŭstria samideano 38 jaraĝa, kiel soldato 1945, kelkajn tagojn antaŭ la militfino.
- Uhrlir,** V., Brno-Kralovo Pole, ĈSR., (Laŭ poŝta sciigo — Mortinta)
- Veen** Arend ano de UEA, 50 jaraĝa, en Amsterdam, 6. VIII. 1946.
- Velkov** Nikola Petrov, 30 jaraĝa, el Batak, Bulgar. Pereis kun 150 aliaj rezistanoj, 1944.
- Vromann** Jules, Roubaix, Francujo Nord. (Gazeto revenis kun indiko „Mortis“.)
- Vojtisek,** Jan, en Lazne Belohrad. ĈSR (laŭ poŝta sciigo — Mortinta —).

# Kie estas kiu?

## Servo de reserĉado de UEA.

### Kvina isto

S-ro Bernhard Aeltermann, estinta D de UEA en Danzig, kunorganizinto de la tiea universala kongreso, nun: Hitdorferstrasse 44-II, (22a) Langenfeld, Rheinland, German., Brit. Zone.

Sinjoro Paŭlo Balkanyi, eks-ĉefdelegito de UEA hungara: nun Budapeŝt 507 (V. Jozsef n. tér. 3-4, 1/2, 6. (Creditbank)

S-ro Paul Blaise, Honora Membro de UEA, nuna adreso: 4, Princes Gate West, Liverpool 8 (Britujo).

S-ino Frieda Boettcher, D de UEA ĝis 1934 en Fabelschwerdt i. Schlesien nun (1) Berlin-Weissensee, Franz Josephstrasse 11. (Docentino por Esperanto ĉe la Popola Altlernejo).

S-ro Leo Brieger, estinta Delegito de UEA en Düsseldorf, nun: Rua Senador Dantas, 73, Rio de Janeiro, Brazilo.

Sinjoro Erich Dahlmann, (1) Berlin-Frohnau, Welfenallee 72, ĝis 1936 ano de UEA.

Sinjoro Onisabro Deguĉi, la fondinto de la OOMOTO movado (ŝintoisma sekto) enkarcerigita de la japana registaro pro lia sinteno homaranisma, liberigis. Adreso: Kameoka, Japanujo.

S-ro Giovanni Della Savia, estinta D de UEA: Via Asilo M. Volpe 47 Udine (Italio).

S-ro Hermann Dix, estinta D de UEA en Zeulenroda, Thüringen, nun: Zeulenroda i. Th. Greizerstrasse 34, (Russ. Zone).

S-ro Willy Duregger, estinta Delegito de UEA: Scheibenstrasse 6-I Traunstein, Bayern, Germ., Amerikanische Zone.

S-ro Josef Engst, estinta malnova ano de UEA 13398 nun: Ulm a. d. Donau, Münchenerstrasse 2, German., Amerik. Zone.

Sinjoro Bruno Fahlke, estinta ano de UEA en Berlin, nun: (10) Auerbach, Vogtland, Mosenstrasse 12, German.

S-ro Karl von Frenckell, DM de UEA, la bone konata finlanda pioniro de Esperanto en Germanujo, kunlaborinto de D-ro Hch. Arnhold en Dresden: nun (16) Kronberg im Taunus, Schillerstrasse 3, Amerikan. Zone.

S-ro K. Geršater, estinta D de UEA en Vilno, perdis tutan familion, (edzinon du filojn, mortpafitaj) nun: Kamienna 6/31, Lodz, Polujo.

S-ro Friedrich Hahn, estinta Delegito de UEA en Perleberg, nun: (3) Grabow, Kreis Ludwigslust, Mecklenburg, Rotdornweg 3 (German., Russ. Zone).

S-ro Bernhard Heselhaus, estinta D de UEA en Wesel, urbo detruita, nun: (22a) Hüls bei Krefeld, Richard Wagnerstrasse 16 (Britische Zone).

S-ro Günther Jacob, estinta D de UEA en Oppeln O. S. kaj Groschowitz, nun: Postfach 140, (13b) Pfaffenhofen-Ilm, Germ. (Amerikanische Zone).

S-ro Herbert Jasparr, estinta VD de UEA: (10) Grimma in Sachsen, bei Leipzig, Klosterstrasse 10-I (Russ. Zone).

Sinjoro Talivalds Indra, latva ĉefdelegito de UEA, Riga, laŭ informo nun ricevita, estis deportita en Ruslandon, en jaro 1941.

S-ro Ladislao Izso, Bezeredi u. 10-II-22, Budapeŝt VIII.

S-ro A. Klimas, litova samideano el Kaunas, nun: Lithuanian Camp. Kempten i. Allgäu, Bayern (Amerikanische Zone).

Sinjoro Joze Kozlevĉar, fidela Zamenhofano, restadis de 1943 ĝis militfino en Dachau. Adreso nuna: Mestna hranilnica, Ljubljana, Jugoslavio.

Sinjoro D-ro J. Krentzer, Oberstudiendirektor, verkinto de la libro „ESPERANTO ein Kulturgut“: (16) Frankfurt am Main, Karl Stielerstrasse 4.

S-ro Josef Kunert, estinta ano de UEA de 1921 ĝis 1938, el Troppau (Opava Ĉeĥoslovakio) nun: Flüchtlingslager, Obermedlingen, Kreis Dillingen, Donau, Germanujo. Amerik. Zone.

Prisonnier de guerre Walter Lukas, no. matr. 268 848, Dépot 86, Faverney (France).

S-ro Franz Mayer, esp. propagandisto en Bohemio, estinta D de UEA en Goldenöls bei Trautenau, Ĉeĥoslovakio, nun: Ronshausen 140 (16) bei Bebra, Kreis Rotenburg a. d. Fulda, Grosshessen, German., Amerikanische Zone.

S-ro Fritz Michalek, estinta D de UEA, laste ano en Bela pod Bezdezem, Ĉeĥoslovakio, nun: (10) Nosswitz Nr. 57, bei Rochlitz an der Mulde, Sachsen (Russische Zone).

S-ro Max Mittag, estinta D de UEA en Hannover: Nun (20) Hannover, Stolzstrasse 48-II, Amerikanische Zone.

S-ro Max Mollenhauer, ano de UEA de 1912 ĝis la malpermeso de Esperanto en Germanujo, nun: (22a) Geldern, Postfach 4, Nordrheinprovinz, Britische Zone.

S-ro Oswald Orf, estinta D de UEA en Elberfeld, nun: (22a) Dornap 349, Rheinland, Britische Zone.

S-ro Heinz Reinhold, estinta ano de UEA en Bydgoszcz, Polujo: Thann no. 25, (13-a) Post Riedenburg, Oberpfalz, Bayern Amerikanische Zone.

Sinjoro Otto Rieck, estinta Delegito de UEA en Hagen, Westfalen, perdis ĉion sekve de bombardado per fosfora bombo, 15. 3. 1945 kaj nun troviĝas en (13b) Tegernsee (Oberbayern) 1 Hindenburgstrasse, bei Horn (German.)

S-ro Fritz Sauer, estinta D de UEA en Dinkelsbühl, Bavario, perdinte ĉion sekve de bombardado, nun: München 25, Hölderlinstrasse 12-I German., Amerikanische Zone.

S-ro James D. Sayers, usona samideano: Frankfurt a. Main, Wolfgangstrasse 11 (Radio Morse) Amerikanische Zone.

S-ro D-ro Petro Schacht, DM de UEA, estinta prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo, nun: Calea Grivitei 129, Bucaresti, Rumanio.

S-ro Alfred Schnabel, Sudetgermano el . . . . nun: (14a) Wendlingen am Neckar, Kögengerstrasse 49, Amerikanische Zone.

S-ro Kurt Schönrich, estinta D de UEA en Wiesbaden, malnova esperantisto, nun: (16) Wiesbaden, Germanujo, Scharnhorststrasse 26-I.

S-ro Ladislaus Schöntag, (eks-Sintak) el Sudeta regiono de Ĉeĥoslovakio, estinta ano 16720 kaj delegito de UEA, nun: (19) Bernburg a. d. Saale, Albrechtstrasse 3, Prov. Sachsen, Russ. Zone.

Sinjoro Johann Schröder, Delegito de UEA ĝis 1936 en Krefeld, Rheinland, Lindenstrasse 5, (Britische Zone) Germanujo.

S-ro Werner Schwarz, estinta D de UEA en Köln, nun: Prisoner of war no. 109 401, c/o PoW Postal Section, Middle East (Egiptujo).

S-ro Friedrich Skupin, estinta D de UEA en Dossenheim a. d. Bergstrasse, nun: (13a) Lichtenfels am Main, Oberfranken, Amerikanische Zone.

Sinjoro Ivan Steinberger, ano de UEA el Sarajevo, nun: UNRRA D. P. Camp. A, Klagenfurt (Aŭstrio).

S-ro Petro Stojan, Blausasc-Escarène, Alpes Maritimes, Franc.

S-ino Elsbeth Szymanowski, estinta D de UEA: An den Giebeln 12, (2) Luckenwalde, Mark Brandenburg, Russ. Zone.

Sinjoro Petro Vitols, estinta ano de UEA el Riga, rifuĝinto en Lübeck, German., Oni povas skribi al li pere de la Delegacio de la Ruĝa Kruco Latva en Belgio, 377 Ave. Louise, Bruxelles.

Soldat Anton Wagner, PoW 31 G 765 616 German U. S. Army, P. W. J. B. France, C. C. E. 23 (Estinta ano de UEA el Reichen, Kreis Tetschen C. S. R.

Sinjoro Hermann Wagner, Studienrat, ano de UEA 19632 en Fürth i. B., nun: (13b) Oberstdorf i. Allgäu, Freibergstrasse 272-1/11, Bayern (Amerikanische Zone).

Sinjoro Harry Wilke, (eks-delegito de UEA en Berlin, leĝas nun: (1) Berlin-Mariendorf, Ringstrasse 86, bei Hebert.

### Oni petas informon!

En tiu ĉi rubriko ni publikigas petojn de samideanoj serĉeantaj familianojn perditajn, dislokitajn aŭ rifuĝintajn. Laŭeble oni informu la petinton rekte.

Kiu scias ion pri:

GARRITZEN AGRICOLA, nask. la 17-an de Oktobro 1915a en Nederlando.

Laŭ onidiroj li povas esti Mainzerstrato 54, EVERDING ĉe LINZ. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ sendi eventualajn sciindaĵojn al: Jakob Telling, Cefdelegito de UEA en la Nederlanda Teritorio, Schietbaanplan 106a, ROTTERDAM.

Pfennigwerth, Heinz, germana soldato, malaperinta la 14. I. 1942 en la regiono de la Selguer Lago, vilaĝo Saborowka/Veršni-Klin, Gub. Tver, Rustando, Supozeble militkaptito en URSS Utilajn sciigojn al la patro, Rob. Pfennigwerth, Delegito de UEA, Hirschfelde i. Sa., Ernst Thälmannstr. 69, (German., Russ. Zone)

Oni deziras informojn pri S-ino Stella Unger, estinta F-ino Stella Krestanov, lasta adreso, Comeniusstrasse 17, Dresden A 16 kaj pri S-ino Margarete Eichler-Krestanov, lasta adreso Wintergartenstrasse 9, Dresden A. 16.

Antonius Aloysius Suerink, samideano el Wassenaar, Nederlando, Louisestraat 13, petas informojn pri la mortkialo de sia filo Antonio Suerink, nask. 1922, en Diepenveen, Nederlando, mortinta 17an de Marto 1944 je la 8-a horo en Konzentrationslager Buchenwald b. Weimar, no. 28 826, Block 17, Petegas ĉiun kiu povus doni informojn kaj volonte repagos kostojn.

Kolonelo Alexandre Van den Heede, nask. 19. Septembro 1886 en Antverpeno, politika kaptito sen identec-paperoj. Transportita en koncentrejo de Flossenburg, n-ro 2145. Troviĝis poste en Offenburg (Baden). Oni asertas, ke en 1945 li estis vidita en Polujo, loko Idelce (?) Supozeble perdis memorkapablon pro malbona traktado. Utilajn sciigojn, precipe de kunkaptitoj, al Esperantista Interhelpo, Palais Wilson, Genève aŭ al samideano C. Rogister, 21 Avenue Golenvaux, Namur, Belujo.

### Interhelpo

S-ro Herbert Hofmann, (13b) Augsburg 3, Bayern, Schisslerstrasse 15-I, USA Zone, estas en granda mizero. Goje akceptas uzitajn vestaĵojn kaj ŝuojn por okjara knabino. Li mem bezonegas pantalonon, jakon, ĉemizojn k. a. Esperantisto de 1919, laboristo mal-nazi-ulo konfirmata.

## Universala Esperanto-Asocio

Palais Wilson - Genève (Svislando)

### Oficiala Informilo 1946 (6)

#### Adreso de UEA.

Laŭ la akto de la kunfandiĝo, la Centra Oficejo de UEA en Genève, daŭrigas sian laboron, sed dediĉas sin speciale al la servoj, dume la oficejo en Britujo okupigas pri la administrado. La adreso de UEA en Genève do restas la sama: Palais Wilson.

### Honoraj Membroj de UEA.

La Estraro de UEA nomis la jenajn personojn kiel Honorajn membrojn:

Sinjoro Einar Adamson, Göteborg, Svedlando.

Sinjoro Emile Borel, Lyon.

Sinjoro Bernardino Martins d'Almeida, Lisboa Portugalujo.

Sinjoro Daniel Chagnoux, Yzeure sur Allier, Francujo.

Sinjoro D-ro Antoni Czubrynski, Varsovio, Polujo.

Sinjoro Manuel de Freitas, Porto, Portugalujo.

Sinjoro D-ro Stanislav Kamaryt, em. profesoro, Chotebor CSR.

Sinjorino Gisela Nuhamovici-Harabagiu, Bucuresti, Rumanio.

Sinjoro Radomir Klajić, Beograd, Jugoslavio.

Sinjoro A. W. Thomson, Bexleyheath, Anglujo.

Elektante ĉi tiujn fidelulojn kiel Honorajn Membrojn, la Estraro de UEA volis esprimi sian dankemon pro fideleco en kriza tempo.

La elekto de Sinjorino Gisela Nuhamovici, fratino de nia bedaŭrata Cefdelegito rumana HARABAGIU, mortinta en 1944 sekve de bombardado, celas postmortan honorigon de tiu ĉi absoluta Zamenhofano, esperantisto modela. Trovu Sinjorino Gisela Nuhamovici en tiu ĉi elekto nian esprimon de dankemo al ŝia frato, nia kunlaborinto kaj amiko neforgesebla.

### Delegitoj de UEA.

Eksterordinare granda estas la nombro de la novaj lokoj kun Delegitoj. Pro la kunfandiĝo de la du organizaĵoj ĉiu unuopa propono devas esti ankoraŭ ekzamenata. La informo pri la elekto aperos do en la venonta numero de la gazeto ESPERANTO, (oficiala informilo).

### Dumvivaj membroj de UEA.

Pro teknikaj kaŭzoj, la jenaj aliĝoj de Dumvivaj membroj ne estis komunikitaj ĝis nun en kutima formo. La sekvantaj personoj bonvolis montri sian fidon al la malnova UEA, pagante la kotizon de DM. Ili rajtas ricevi dumvive la gazeton ESPERANTO, la jarlibron kaj aliajn eblajn rajtojn fiksojn de la Komitato.

266.— Sinjoro Robert Frochaux, Boudry, Svislando.

267.— F-ino Vermaas, Rotterdam, Nederlando.

268.— Sinjoro Arnošt Vana, Zilina, Ĉeĥoslovakio.

269.— Sinjoro Edward W. Pharo, jr., Philadelphia, Pa. Usono.

270.— Sinjoro Hans Jakob, Hon. Administranto de UEA, Genève.

Ni kore dankas al la aliĝintoj por la monstro de fido al nia Asocio.

### Kunfandiĝo de UEA kaj IEL.

Diversaj neantaŭvideblaj komplikajoj en la efektiviĝo de la kunfandiĝo, malebligis ke la kunigita organizaĵo ekfunkciu de la komenco de la jaro 1947. Nun la kunfandiĝo estas realaĵo. La ĉefdelegitoj de UEA ankoraŭ funkciantaj nun, bonvolas atendi nian informon pri la situacio rilate je la enkasigo de la kotizoj. Generale la kotizoj estas tiuj, kiujn anoncis Internacia Esperanto-Ligo komence de la nuna jaro. Plie en landoj kun Cefdelegito de IEL, la CD de UEA interkonsentu pri la plej bona metodo transdoni alvenintajn aliĝojn por 1947.

La nomo de la kunigita organizaĵo estos do **Universala Esperanto-Asocio**. Kompleta informaro pri la funkciado, transiro, administrado, servoj, k. t. p. aperos en la unua numero de ESPERANTO, presota en Britujo, kaj elironta komence de Aprilo (N-ro 499).

### Prokrasto de nuna numero

Per tiu ĉi numero (498) la sesa de 1946 finas la jaro 1946. Ĝi estis presata nur dum Februaro por ke ni povu aldoni ankoraŭ iujn informojn pri la kunfandiĝo. Ni petas niajn legantojn senkulpiĝi tiun ĉi naturdevigan prokraston.

Genève, 31 Decembro 1946.

Hans Jakob.

Hon. Administranto de UEA

## Internacia Korespondado

Ĉiu anoncanto havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al ricevita korespondaĵo pere de tiu ĉi anonco. Mal-longigoj: PI = poŝtkartoj ilustritaj, L — letero, PM = poŝtmarkoj, k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj.

\*

**Aarhus** (Danlando) — S-ro L. Moesgard Larsen, Jagergaardsgade 138-I, PM., L., k. ĉ. l. Interesiĝas ankaŭ pri PM katalogoj.

**Amsterdam C** (Nederlando) — S-ro F. de Rijk, Blankenstraat 10 Hs, PI, L., kun svisaj esperantistoj.

**Arad** (Rumanio) — S-ro Jozefo Wohlberg, delegito de UEA, str. Episcopul Grigore Comsa no. 25, PM nur kun seriozaj kolektantoj laŭ katalogo Zumstein 1946. Deziras eŭropajn PM laŭeble neuzitajn en serio komplete, akceptas ankaŭ uzitajn nedifektajn bele stampitajn. Sendo per rekomendita letero, aerpoŝte. Komuniku vian mankoliston pri Rumanujo. Sendaĵo ne sub valoro de 50 fr. sv.

(1) **Berlin-Zehlendorf** — S-ro Gerhard Klau, Seehofstr. 24, Postfach 56, L., PK k. ĉ. l.

**Buenos-Aires** (Argentino) — S-ro Eriberto Garcia Bulnes 757, PI., PM., k. ĉ. l.

**Ituna** (Kanado, Sask.) — S-ro H. M. Reyner, Box 105, L., PI kun samideanoj en Svislando.

**Kralovice u Plzne** (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Prof. Petr Zévl, eldonanto de ABC-tutmonda adresaro. Petu prospekton!

**London W 2** (Britujo) — S-ro Colin Evans, angla islamano, 10 St. Philips Place, L pri Islama religio al informpetantoj kaj pri ia ajn temo rilatanta al Islamo.

(16) **Mainz** (German., Franz. Zone) — S-ro Karl Kaiser, Kirchstr. 69, L., PI, PK., k. ĉ. l.

**Möln** (German., Lauenburg) — S-ro Ernst Frank, poŝt-oficisto, Landhaus Lotte (eksigita pro rezisto al Hitlera movado en 1933), L., PI., PM. sigelmarkoj, esp. gazetoj. Korespondi pri la opinio de negermanaj landoj pri German.

**Montluçon** (France, Allier) — S-ro Marien Meynot, 9 rue Notre Dame, serĉas korespondantojn en Bulgario, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarlando, Latvio, Litovujo, Novzelando, Norvegio, Usono, PI., L.

(13 b) **München 8** (German., US Zone) — S-ro Erich Dilger, Hörsselbergstrasse 14-I PM., L., sin serioze interesas pri kulturo de suk-kaj grasplantaĵoj, kakttoj, eŭforbioj, cereoj, opuntoj k. a.

**Ried im Innkreis** (Aŭstrio) — S-ro Hans Jungschaffer, Direktoro, kolektas ĉiulandajn politike interesajn glumar-kojn pro-kaj kontraŭ naciismo, komunismo, milito. Kompense mi sendas filatelie bele afrankitajn leterojn.

**Tirnov** (Bulgario) — S-ro Georgi Donĉev, str. Gurko, 1, PI., L., k. ĉ. l.

**Vaasa** (Finnlando) — S-ro Errki Mansikka, Raastuvankatu 55, PI., L., PM. k. ĉ. l.

**Voitsberg** (Aŭstrio, Steiermark) — S-ro Johano Javernik, kompostisto, PI., PM., k. ĉ. l.

**Wien VII/62** (Aŭstrio) — S-ro Rajmund Cech, CD de UEA, Lindengasse 8-II/11 L., PK., PM.

**Wien 55** (Aŭstrio) — S-ro Leo Weber, Siebenbrunnengasse 7 i/26 m studento, L., PK kun junuloj pri ĉio precipe arto literaturo, filozofio, okultismo, religio ktp.

**Zaandam** (Nederlando) — S-ro C. Wals, Greenlandstraat 12 L., PI kun svisaj esperantistoj.

Leginda kaj posedinda:

### VIVO DE ZOLA

De Augusteno de Silva, tradukis M. de Freitas.

106 paĝoj — Prezo 2.60 Fr. sv. aŭ 8 respondekuponojn.  
Portugala Eldona Rondo Monte da Lapa 49-I, Porto.

## Petoj kaj proponoj

**Ĉiu ne-katoliko** kiu interesas sin pri la doktrino de la katol. religio aŭ ties praktikoj, senpage povas ricevi informojn pri tio ĉe la INTERNACIA KATOLIKA INFORMEJO Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Ladovaroj** — Ladisto Mehmed Jakupov'ĉ, en Zemun, Jugoslavio. Mate lviĉa 2, petas ke oni sendu al li katalogojn de firmaoj kiuj produktas ĉiaspacajn ladovarojn. Rekompencas per neuzitaj poŝtmarkoj.

**Skribmaŝin-klavaro.** — Grava firmo estas interesata pri studado de bazo por raciigita klavaro por la skribmaŝino, uzota por la lingvoj kun latina tiparo. La subskribinto, kiu faris laborsciencan esploron pri la uzo de la skribmaŝino petas, ke unu samideano de ĉiu grava lingvo de la koncerna grupo helpu al mi por kolekti konforman statistikon el sia propra lingvouzo. Ĉar estas necese havi kompareblajn, laŭ samaj principoj kolektitajn statistikojn, volu unue peti de mi la instrukciojn. Temas pri la laboro de ĉ. 10 horoj por ĉiu lingvo. Montru, ke esperanto povas grave helpi en studo de kultura-teknika problemo de internacia graveco!

Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki-Kä. Finnlando.

**Libro-interŝanĝo.** — Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49-I, Porto, Portugalio sendos siajn popolklerigajn eldonaĵojn „La araneoj” kaj „La vivo de la eskimoj” 28 kaj 32 paĝa, kontraŭ samvaloraj Esp. libroj, uzitaj sed sendifektaj aŭ novaj. Respondekuponoj akceptataj. Unu libreto kosta 2 respondekuponojn, ses ekzempleroj kune 10 Resp. Kup. Ne-uzitaj puraj poŝtmarkoj estas ankaŭ akceptataj (prefere memorigaj) sed tiuokaze oni aldonu 20 %.

